


SUDFRANCIA STEELO




Bulteno de la Federacio Langvedoko-Rusiljono

N° 136 - 1a kvaronjaro 1996 - Jarabono: 3OF

Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon CCP956-28P Montpellier
chez L. Négron 40, Chemin des Amandiers 34400 Lunel

OFICIALE : La **Universala Kongreso** de UEA okazos en Aùgusto **1998** en **Montpellier** (Francio).

Fine de Marto Osmo Buller, la nova ĝenerala direktoro de UEA (el Finnlando), venis al Montpellier kun Claude Nourmont, renkontis la provizoran LKK (lokan kongresan komitaton) kaj ankaŭ la respondeculojn de la urbdomo kaj de la kongresejo "Corum". Poste la estraro de UEA elektis Montpellier kiel kongresurbon en 98. Prago en 96, Adelaïde en 97, Montpellier en 98, eble Berlino en 99... La lasta UK (Universala Kongreso) okazinta en Francio estis tiu de Marsejlo (Marseille) en 57! Kompreneble la veno de 2000 aŭ 2500 kongresanoj signifas gigantan preparlaboron por la LKK. Ne hezitu proponi vian helpon antaŭ kaj dum la kongreso! Ni bezonas vin!



C'est fait ! La décision d'UEA est arrivée : Montpellier, ville du congrès universel de 1998. Il y a peu, Osmo Buller, le nouveau directeur général d'UEA, est venu avec Claude Nourmont, présidente d'UFE (UFE aura cent ans en 98), s'informer des possibilités d'un congrès en 98. Les conditions lui ont semblé satisfaisantes, la suite est connue. Le comité local (président, Louis Ensuque; vice-présidentes : Yvette Vierre et Jeannine Bony; trésorière : Gisèle Passarella) a déjà accompli un travail important mais, devant l'organisation indispensable à l'accueil de plus de 2000 congressistes pendant une semaine, compte sur votre aide avant et pendant le congrès. Il y a sûrement une tâche dont vous pourriez vous acquitter. N'hésitez pas à vous joindre au comité ! Ce congrès aura un impact considérable pour l'espéranto dans notre région si chacun de nous veut bien y participer : Esperanto estas ĉies afero !



Si 98 vous paraît bien lointain, Mai 1996 est presque là avec notre congrès fédéral à Chamborigaud dans les Cévennes gardoises. Conférence du Professeur Michel Duc-Goninaz de l'Université d'Aix en Provence, débat avec Llibert Puig, de l'association catalane d'Espéranto, films vidéo en espéranto (Angoroj, E° tra la mondo, Mazi, Egiptio), théâtre, gastronomie cévenole, inauguration officielle d'une rue Zamenhof avec lâcher de ballons par les enfants de l'école. Que demander de plus ? Venez passer une fin de semaine au vert ! Détails sur cette rencontre pages 2 et 3 : n'oubliez pas de vous inscrire rapidement !

Pli proksima de ni estas la federacia kongreso en Chamborigaud la 4an kaj 5an de Majo 1996. Riĉa kaj agrabla programo atendas vin; eĉ komencantoj povos profiti grandan parton de ĝi (vidu detalojn sur la paĝoj 2a kaj 3a). Inter aliaj, ni menciuj prelegon de Profesoro Michel Duc Goninaz, debaton kun nia amiko Llibert Puig el Katalunio, filmojn kaj teatraĵeton en Esperanto, oficialan inaŭguron de "Strato Zamenhof" kaj lanĉon de aerbalonoj, ne forgesante la cevenan gastronomion. **Pasigu verdan semajnfinojn en Chamborigaud!** Kaj pro la datoj, ne forgesu rapide aliĝi !



Forpaso:

La esperantistaro de la regiono kaj pli speciale de Nimo malĝojas pro la forpaso de S-ro Laval. Kvankam li translokiĝis al Avinjono antaŭ pluraj jaroj pro sanproblemoj, neniu estis forgesinta lin. Li ne nur estis elstara esperantisto (kaj liaj skribaĵoj restos kiel atestoj) sed ankaŭ saĝulo kun profunda humanismo. Escepta homo forpasis. Ni kondolencas al liaj familianoj. (Omaĝo de Jean Amoureux estas sur la paĝo 5).

VIVO DE LA GRUPOJ

ALES

Post rezigno de S-ro Cornut kiel prezidanto de la loka grupo, S-ro Henri Vigne estis elektita nova prezidanto. Gratulojn kaj bonan sukceson ! S-ro Cornut estos la kasisto de la grupo "la verda stelo", F-ino Pical la sekretariino . La grupo planas partopreni la forumon de asocioj en Oktobro.

BEZIERS

Kunvenoj: la 13an de Aprilo : monata kunveno malfermita al ekstera publiko.La temo estos : Esperanto kaj amasinformiloj
la 18an de Majo : pro diversaj kialoj, la maja kunveno okazos la trian sabaton de Majo, la temo ne estas decidita .
la 8an de Junio : ĝi estos la lasta kunveno antaŭ la libertempo de somero. Grava kunveno, ĉar ni decidis pri la datoj de la venontaj kunvenoj, speciale pri la agadoj en Septembro.

STAĜO en BATIPAUME (por ĉiuj legantoj de SFS)

Rememoru, ke ĝi okazos de la 12a ĝis la 16a de Junio. Vi trovos informojn k, aliĝilon en la antaŭa SFS (n° 135). Estas rimarkinde, ke, parte, ni starigis tiun staĝon cele allogi la regionanojn, kiuj trovas Grésillon (ekzemple) iom malproksima kaj ne povas partopreni kongreson eksterlande. Nu, ĝenerale, multaj venas de pli malproksimaj urboj. Kial ? Mistero... Mensogigu nin kaj venu amase !

Agde: Kadre de la "kampanjo en la kolegioj", sekve de la invito de la kolegio P-E. Victor, Suzanne Authier kaj Jeannine Bony prezentis esperanton al "4a"klaso, t.e. 13-14 jaraĝaj gejunuloj. La klasanoj levis multajn demandojn same kiel la instruisto pri la franca lingvo. Alia prezento al la kolegio de Limoux (11) fare de Jean Hénin estis antaŭvidita, sed pro lokaj strikoj estis prokrastita ĝis Majo.

MONTPELLIER

Kiel vi legis sur la frontpaĝo, Montpellier estis elektita kongresurbo por 1998. Ampleksa laboro antaŭvidebla. Montpellieranoj kaj najbaroj, federacianoj, kuniĝu kun la kongreskomitato, kies prezidanto estas Louis Ensuque, 7 Rue Gustave , 34000 Montpellier. Vi trovos regule informojn en SFS pri la progreso de la preparlaboro.

La lasta SFS anoncis la "internacian semajnon" de Sète, de la 9a ĝis la 16a de Septembro.

Post la kunveno de la 3a de Aprilo (lumbildoj pri la UK de Tampere - Finnlando), notu la datojn de la venontaj : la 22an de Majo (kaj ne la 15an pro Ĉielirado la 16an de Majo) en La Paillade kaj fine la 19an de Junio en l'Escoutaire. Por ambaŭ kunvenoj : aktualaĵoj, informoj.

NIMES

Ne alvenis informoj pri la grupo, kiu tamen funkcias. Kiu bonvolos informi nin venontfoje ?

ALVOKO al la Esperantistoj de la departemento GARD :

La federacia kongreso ne okazis en via departemento de pluraj jaroj. Ĉijare ĝi okazos proksime de vi en pitoreska vilaĝo, facile atingebla per aŭtomobilo aŭ trajno. La urbestraro disponigos al ni tre taŭgan kunvenejon kun la necesa materialo, inaŭguros straton Zamenhof. Diversaj programeroj devus kontentigi ĉiujn gustojn . Manĝoj je moderaj prezoj, ktp. Pasigu kelkajn horojn kun viaj samideanaj najbaroj aŭ najbaraj samideanoj (el Drôme, Ardèche, Hérault, ktp) ! Nepre venu, ĉu sabate, ĉu dimanĉe, ĉu por ambaŭ tagoj ! Ĝis !

Appel aux Gardois et Gardoises : *Le congrès fédéral ne s'est pas déroulé dans votre département depuis plusieurs années. Cette année, il aura lieu près de chez vous, dans un village pittoresque, d'accès facile en voiture ou par le train. La municipalité mettra à notre disposition une salle tout à fait adaptée (foyer communal) avec le matériel nécessaire, inaugurerà une rue Zamenhof. Programme varié pour satisfaire tous les goûts. Repas à prix modérés, etc. Passez quelques heures avec les espérantistes des départements voisins ! Venez donc, soit le samedi, soit le dimanche, soit les deux jours ! A bientôt !*

RAYMOND LAVAL (1900-1996)

Mortis Valo .

Mortis amiko .

Mortis la multŝatata saĝulo, kies rememoraĵoj kaj opiniaĵoj "Vortoj" en "Laùte" altiris kaj katenis la legantojn . La stilo kaj la vortoj estis simplaj, la lingvaĵo senriproĉa kaj la temoj cerbumigaj ĝis la alto de filozofio.

Kiam li estis 75-jara venis al Valo la deziro retrorigardi en la spegulo de la travivita tempo, ne pro nostalgio, sed ĉar la forto de imago estis por li la neanŝtataŭebla radifonto por la pluvivo de "la arbo maljuna, en malfrua aŭtuno..."

Tiel aperis, eldone de "Laùte", la unua kajero, plurfoje reeldonita, de lia membiografio, la leginda "...el la kara infaneco", kies vivokadro situas en Aleso kaj en Florako. Sekvis la tri pliaj kajeroj : "Kontraŭflue", "Sepdek jaroj sub la verda stelo" kaj "Migrante tra metioj".

Samkolekte aperis liaj tradukoj de verkoj i.a. de Han Ryner kaj de "Poemo de Rodano" de Frédéric Mistral al li tre kara .

Siatempe Raymond Schwartz ofte vokis la kroman talenton de R.Laval por karikature ilustri siajn verkojn kaj la satiran "La Pirato".

R. Laval aliĝis al S.A.T. en 1934 kaj estis dum jaroj sekretario de ties Literatura Komitato. Liaj recenzaj kaj verkaj kontribuoj ne malofte pliriĉigis "Sennaciulo"-n kaj "Sennacieca Revuo"-n .

Neniu, kiu sin turnis al li, ĉu por peti klarigon, konsilon aŭ opinionon, ĉu por lin kontraŭdiri, povis plendi , ke li ne ricevis klaran kaj detalan respondon, ĉiam ĝentilan kaj tolere-man, sed firman.

En la 1980-jaroj la grupo de Nimo kaj "Sudfrancia Stelo" havis la privilegion ĝui la eminentan lingvoscion de Valo.

Ne nur li estis ĝismedola esperantisto (lia diplomo "Atesto pri Kapableco de Esperanto" datas 11-an de julio 1914), sed li estis simpla, bonkora kaj fieris, ke li daŭre estas kaptita de la zamenhofeca idealo .

Kiam li tute blindiĝis, kun la kara edzino ili forlasis Nimon kaj loĝis en Avinjono ĉe rezidejo por maljunuloj . Tie ambaŭ mortis .

Esperanto-verkemo ne forlasis lin eĉ ne kiam estis nepre necese amputi lian maldekstran kruron .

Li povis nek legi, nek skribi, nek bone sidi aŭ kuŝiĝi. Li krome estis surda.

De kiam mortis la tiom amata edzino Ivona io pli rompiĝis en la koro de Valo.

En Avinjono nia samideano André Gente peris al Valo, kio mankis al la kriplita korpo . Valo povis tiel pluri la esperantistan vojon celitan kaj, ĝis la lasta momento, pluaperis "Vortoj de Valo" en "Laùte" .

La 18-an de marto ĉesis bati la nobla koro tre verŝajne dum siesto . La senviva korpo estis transportita al la medicina fakultato de Montpeliero.

Al la morto jam de longe li estis preta.

Du tagojn antaŭ lia elmondiĝo estis ekspedita "Laùte" n° 122 de marto/aprilo 1996. Ĝi enhavas du tekstojn de Valo, kiujn, kiel kutime, peris André Gente : "Pensi en Esperanto", lasta omaĝo al lia senkondiĉa modelo, Lanti, kaj "Funebro kaj rido", temo kiun li plurfoje serene pritraktis .

Skribante tiujn ĉi liniojn, mi konfesas, ke funebras mia koro, kaj mi tute ne emas al rido.


Al tiuj kiuj ne bone konas la penson de Raymond Laval, mi sugestas legi "Vortoj de Valo"-n , kiun "Laùte" ĵus eldonis broŝurforme.

merkredon la 20-an de marto 1996

Jean Amouroux

PERPIGNAN

Naskiĝtago: La 30an de Marto, nia doĵeno, federacia Honor-prezidanto, prezidanto de la loka E° kultura centro, jes ja...René Llech-Walter, fariĝis 90jara. Gratulojn kaj bondezirojn por -ĉeesti la Universalan Kongreson de Montpellier en 1998, -atingi la finon de la nuna jarcento kaj la komencon de la 21a jarcento, -festi la 100an datrevenon post 10 jaroj.



La 5an de Majo la muzikgrupo "La Katalunaj Trobadoroj", kiun nia amiko fondis antaŭ 50 jaroj, omaĝos al li en la Kongrespalaco de Perpignan.

Lastminute : pri la naskiĝdatreveno de RLW aperis en "L'Indépendant" longa artikolo kun foto.

Dosiero pri Esperanto:

F-ino Lieve Vervoort el Antverpeno (Belgio), nun studentino ĉe la Universitato de Perpignan, preparis dosieron pri esperanto (ĝi estas havebla de la loka klubo kontraŭ 70 F por la du partoj). Ŝi raportas :

" Sciigo necesas -entuziasmo en Perpignan ne ĉesas "

Mi estas belga junulino kaj bonvole profitas de mia restado ĉi-tie por intersanĝi pripensojn pri la esperanta movado sudfrancie. Post mia alveno en septembro, mi rapide malkovris la verdan stelon de la E°-centro en Perpignan, kaj ĝoje enskribiĝis por la lingvokurso, kiun ĝis nun mi ĉiam sekvas entuziasme.

Obeinta al la proverbo "se koro pleniĝas, lango moviĝas", mi decidis fari dosieron pri esperanto en ĉi-tiu regiono, kaj poste prelegi pri esperanto kaj lingvo instruado, ĉio en la kadro de miaj studoj en la "Centre d'Etudes françaises" de la Universitato de Perpignan. La dosiero (15paĝa) kompreneble troviĝas en la loka E°-centro. Ĝi baziĝas sur kelkaj libroj, artikoloj kaj intervjuo kun S-ro Llech-Walter, la prezidanto de la E°-centro. Tamen pli interese por vi estas verŝajne la disvolviĝo de la prelego, kiun mi faris poste, por la studentoj de la didaktika kurso (nomata F.L.E. - français langue étrangère - la franca kiel fremdlingvo) en la Universitato. Estis grupo da pli malpli 40 studentoj, kiuj sin pretigis por fariĝi instruistoj de la franca eksterlande. Post kelkaj enkondukaj demandoj miaflanke, ili unuanime konfesis, ke la lingvoinstruado en Francio ĝenerale fiaskas aŭ almenaŭ problemegas, t.e. : ili sekvis multegajn horojn da lingvoinstruado kaj tamen ne kapablas inde konversacii en la angla. Mi proponis do serĉi kune eblan solvon, kaj verdire mi miris sufiĉe pro la tiel supla kunlaboro de mia publiko. Ili kvazaŭ senreziste asimilis mian entuziasmon, malkovrinte la tiel simplan solvon : lerni unue esperanton kaj poste plenkuraĝe eklerni aliajn pli malfacilajn lingvojn, kiel ekzemple la anglan. Ili ankaŭ konsentis je la plivaloro de esperanto kiel alirpordo al iu ajn kulturo en la mondo, komparinte kun la angla, kiu nur ebligas aliron al la nordamerika kaj brita kulturoj. Por konkretigi la aferon, mi menciis "Pasporta Servo", "Koresponda servo mondskala", ktp.

Post la prelego mi parolis iomete pri la praktiko, la metodo Cseh kaj aliaj eblecoj por vigligi lingvoinstruadon. Konstatinte, ke multaj el ili tre interesiĝis kaj deziris ankoraŭ pli da informoj pri esperanto, mi rakontis pri la E°-centro de Perpignan. Honeste mi diris, ke ĝi bezonas junulojn (mi estas la sola nun) kaj ankaŭ proponis al la profesoro organizi E°-kurson en la universitato.

Nun mi nur devas plenespere atendi kaj teni la aferon aktuala. Mi mem je ĉiu okazo ne ĉesos stimuli la junulojn . Mi planas ankaŭ enketon en la trinkejo de la universitato, por atingi hazarde kelkajn impresiĝemajn animojn, kaj poste mi komencos la duan parton de tiu antaŭe menciita dosiero, ĉifoje pri la rezultato de la enketo kaj miaj rilataj pripensoj.

Mi certe informos vin en alia numero de "Sudfrancia Stelo" kaj samtempe esperas alvoki kelkajn reagojn.

Via belga raportistino,

Lieve Vervoort .

NDLR: Ni senpacience atendas la duan parton de la felietono kaj gratulas nian junan samideaninon. Malvigilaj grupoj, atentu: ni dungis eksterlandajn spionojn, por kontroli vian poresperantan agadon. Pli serioze: ĉu Perpignan estos la unua universitato en la regiono, kie oni instruos Esperanton? Aŭ ĉu Montpellier, post la UK de 98? En Valencia (Hispanio) de tiu-ĉi monato oni instruas E-on oficiale en la Filologia Universitato, sekve de la UK de 93...

Konkludo povus esti, ke por alparoli gejunulojn plej efikas samaĝuloj. Dum la lasta "Expolangues" en Parizo deĵoris skipo de Jefe ĉe la budo de UFE. Tre kontentiga rezulto.

RODEZ

Nova Kurso: Se la kurso en la MJC ne bone sukcesas, alia kurso kreiĝis en kolegio, sekve de diversaj favoraj cirkonstancoj. Bernard Legeay instruas al dekduo da gejunuloj per metodo adaptita de unu el la lastaj Asteriks-albumoj .

Koncerto: Li nomiĝas Jacques Yvart, estas prezentita kiel "Franca pacifista kanzonisto el Dunkerque"; li kantas en la franca kaj esperanto; li jam registris plurajn diskojn, ekzemple ĉe Eurokka "Bonjour la paix ! Bonan tagon paco !". Li koncertos en Rodez la 23an de Majo kaj dum la sama semajno en pluraj urboj de Suda Francio .

ĈE NIAJ NAJBAROJ

ARIEGE

Revuo ricevita el Ariège : "Asistili", dulingva revuo (F+E°) religikompara, redaktita de Christian Lavarenne, Foyer de culture Internationale, O9800 Balagué, jarabono : 100 Ff.

Tridekdupaĝa, bele presita, ĝi enhavas kontribuojn el diversaj landoj.


KATALUNIO

Unue du informoj aperintaj en "Eventoj".

Omaĝe al esperantisto

En Sabadell, Hispanio, la 15-an de decembro (Zamenhof-tago!) 1995 estis solene inaŭgurita la tabulo, kiu tekstas en la kataluna lingvo: *Pasejo de Luiso Mimo.*

Luiso Mimó Espinalt, Sabadell 1913-1986, verkisto kaj profesoro de Esperanto.



Pri tiu evento publikigis raportajon kun foto la gazeto "Diari de Sabadell", 19-an de decembro 1995.

Estas presita ankaŭ la foto, montranta florkronadon ĉe la monumento al d-ro Zamenhof.

Trezoro en Hispanio

Hispana E-Muzeo komunikis novajn ciferojn: fine de januaro 1996 la Muzeo havis 9710 librojn, 12910 jarkolektojn el 3134 titoloj (6959 kompletaj). Krome 96 sonbendojn kaj 25 videofilmojn pri Esperantaj aferoj.

Kontaktadreso:

*c/o Luis Ma Hernandez Yzai,
Ap. de Correos 83, ES-08720 Vilafranca
Del Panadés, Hispanio
inf: rotsaert@kick.knooppunt.be*

Due anonco pri **aviadila karavano al Prago el Barcelono** :

"Foriro : vendredo 19 julio je la 21.00 h. Reveno : sabato 27 Julio je la 9.30h.

Kunvojaĝu kun ni en tre samideana kaj agrabla etoso kaj je la favora prezo de 52 000 pesetoj, iro k. reveno, Barcelono-Prago-Barcelono. Antaŭpago de 10.000 p-toj. Aliĝilo havebla de SFS".

Kontaktadreso : Kataluna E°-asocio Poŝtkesto 290 , O8200 Sabadell, Katalunio.

NDLR : Se vi decidis partopreni la UK de Prago kaj ankoraŭ ne decidis pri la transportorimedo, jen do konsiderinda propono. UFE proponas karavanon de la 14a ĝis la 28a de Julio kun tutsemajna vizito de Bohemio; la prezo, sen la aliĝo al la UK kaj la manĝoj dum la kongresa semajno, superas 9 000 F...

Plej malmultekoste estas la vojaĝo per buso (Eurolines). Se vi deziras veturi aŭtomobile tien, kontaktu SFS.

Trie : **Komuna(j) kongreso(j):**

La Kataluna Kongreso okazos en 97 proksime de nia landlimo pro la projekto kunkongresi. Nia federacio povus je tiu okazo kongresi samtempe kaj samloke; certe venus Tuluzanoj kaj Provencanoj, tiel estus kunkongreso de "Suda Francio" kaj Katalunio. Pliaj detaloj en Chambo-rigaud, kie verŝajne ĉeestos S-ro Llibert Puig, ĝenerala sekretario de la Kataluna E°-Asocio. Katalunio ankaŭ proponis sin por la Eŭropunia kongreso (plurlanda kongreso) de 99, post Parizo en 95, Stuttgart en 97. Do, eble alia interesa kongreso je niaj pordoj.

Les espérantistes de notre région ont bien de la chance : jusqu'à la fin du siècle, des congrès intéressants vont se dérouler près de chez eux : en 96, le congrès national de Lyon, en 97 un congrès commun avec les Catalans près de la frontière, en 98 un congrès universel à Montpellier, en 99 peut-être un congrès européen au bord de la Catalogne. Plus d'excuses vraiment pour rester chez soi ! Encouragez ceux qui organisent ces rencontres en participant vous-même et en informant vos connaissances; c'est aussi la bonne occasion pour recruter !

LIONO

Ĉar la programo de la kongreso estis lastatempe modifita, laŭ peto de la estraro de UFE (kiel en Agde), petu la definitivan programon de SFS, se vi intencas partopreni (ĝi aperis en la marta numero de "Franca Esperantisto").



88e CONGRES NATIONAL
ESPERANTO - FRANCE

16-19 mai 1996




FESTO en Francio

Jam de longaj jaroj JEFO ne organizis renkontiĝojn en Francio...

Jen finfine la okazo francumi esperantlingve, esperantumi francie, unuvorte FESTI!

FESTO, de la 16-a matene ĝis la 19-a de majo vespere, 4 tagoj sen-temaj por babilo, promeni, danci, kanti, ridi, kafoklaĉi...

Kunportu viajn muzikilojn, kantarajn, promensuojn, ban-kostumojn, vitaminojn... Kontribuu per prelego, kurso, spektaklo ktp.. Rabato eblas laŭ bezonoj de la LKK.



Sen temo ne signifas sen programo: FESTO konsistas unue el vizitoj kaj ekskursoj; estos ankaŭ koncertoj (Kanzona, rok-ĝaza), kursoj (pri Esperanto, la franca, popol- kaj rok-danco, jingo...), prelegoj kaj diskutoj diversaj.

Kotizoj: depende de la tempo de aliĝo inter 38 kaj 57 NLG, loĝado (en 4-6-litaj ĉambroj) - po 60 NLG por nokto, manĝado - ĉ. 20 NLG tage.

Plia informo, aliĝoj ĉe:

Pascal Lécaille, B.P. 3019, F-69394 Lyon
Cedex 03, Francio.

Tel.: +33-72-360714

PROVENCO

Zamenhof-monumento en Francio

La 4-an de majo de tiu ĉi 1996-a jaro, la urbaj instancoj de Aix en Provence, apud Marsejlo en suda Francio, starigos memorigan slabon honore al L. L. Zamenhof. Tion nia grupo atingis post multjaraj klopodoj.

La monumento konsistos el duoncirkla granita bloko kun bronza medaliono reprezentanta la kapon de Zamenhof en juna aĝo. Ĝi surhavas duoblan surskribon, en E-o kaj en la franca lingvo, pri la fakto, ke li kreis Esperanton, la internacian lingvon, en 1887. Oni lokigos tiun blokon ĉe la vojkruciĝo de du stratoj: rue des Espérantistes (strato de la Esperantistoj) kaj alia avenuo de nia urbo. Tie centre kuŝas vasta cirklo kun herboj kaj arboj. La monumento staros piede de unu el la tieaj pinoj.

Por montri kaj pruvi al nia urbestro, ke Esperanto daŭre plu vivas kaj viglas, kaj ke nia loka eventeto povas akiri mondskalan dimension, ĉar ĝi koncernas kaj interesas multajn ne nur en Francio, sed ankaŭ en aliaj landoj, ni bezonus la helpon de nia Esperanta reto, kaj jen mia peto al vi: ĉu vi bonvolus sendi rekte al nia urbestro (kies adreson vi trovos sube) letereton *en via gepatra lingvo kun esperanta traduko*, en kiu vi diras ke:

- vi aŭdis pri la starigo de monumento honore al L. L. Zamenhof
- danke al tio, la urbo Aix en Provence estas konata en via lando
- vi varme aprobas kaj subtenas tiun iniciativon favoran al Esperanto
- vi dankas la urbestron kaj lian kleran konsilantaron por tiu aĝo

Evidente, tiuj kvar ĉi-supraj punktoj estas nur generalaj indikoj. Via letero ne devas esti ŝablona. Vi povas aldoni kion vi deziras por gratuli la urbestron.

Se du aŭ tri el viaj konatoj bonvolas same skribi al nia urbestro, ŝajnas al mi, ke tiu starigo fariĝos memorinda evento ne nur en Aix en Provence, sed ankaŭ en Esperantujo. Sur la koverto, nepre skribu la vorton: *Esperanto*.

Ne prokrastu la sendon de via letero, ĉar la tempo rapide fluas. La urbestro devas nepre ricevi tiun korespondadon antaŭ la starigo de la monumento, por ke ĝi fariĝu trafa. Ju pli da leteroj li ricevos, des pli kredinda kaj fidinda fariĝos nia movado!

Se io simila okazos en via lando, ni pretas, evidente, reciproki tiun komplezon.

Niajn plej varmegajn dankojn al ĉiuj, kiuj pere de siaj leteroj helpas ne nur nin sed samtempe ankaŭ Esperanton.

Daniel Moirand
(klubestro en Aix)

Viajn leterojn bonvolu sendi al:
Monsieur Jean-Francois PICHERAL
- Maire d'Aix en Provence -
Hotel de Ville
F-13100 Aix en Provence, Francio

Sammaniere, se vi ne venos al Chamborigaud, kial ne skribi al la urbestro, Sro Munos, ke vi alte takŝas la decidon de la urbestro inaŭguri Zamenhof-straton ?

TULUZO

S-ino Kimie Markarian (Japanino loĝanta en Britio) prezentis la kalkulilon "Soroban" en 5 unu-gradaj lernejoj. Estas projekto inviti dek geknabojn de Kiev, viktimojn de la katastrofo de Ĉernobil en Ste Foy d'Aigrefeuille. Tiucele, klaso de CM2 de la loka lernejo studis Esperanton dum la tuta jaro kaj korespondis kun la ukrainaj infanoj.

PRAGO (vidu ankaŭ en la rubriko Katalunio)

Václav Havel, prezidento de Ĉeĥio akceptis esti alta protektanto de la UK, al kiu ĝis la komenco de Februaro estis jam aliĝintaj 2000 personoj el 53 landoj. Granda UK-afiŝo estas havebla de la CO (Centra Oficejo) en Roterdamo kontraŭ 3 NLG. Ĉijare abundos sciencaj temoj. La Internacia



Kongresa Universitato kunlaboros kun AIS (Akademio Internacia de Sciencoj de San Marino) pri sciencaj kursoj, i.a. de la Nobel-premiito prof. Reinhard Selten pri la ludoteorio.

Ekde februaro la ĉeĥia poŝto propagandas la UK per porokaza afrank-maŝinstampilo ĉe poŝtofiĉejo Strážnice kun teksto en la ĉeĥa. La LKK preparas E-lingvan stampilon kaj E-lingvan glumarkon.

HEGEMONIO :

"Politika hegemonio kaj lingva hegemonio en Eŭropo" estas broŝuro redaktita de Andrea Chiti-Batelli kaj Pierre Janton kaj eldonita de UEA (E°-dokumentoj 33E, ISSN 0165 2524).

"Non à l'anglais hégémonique !" ekkriis en "Midi Libre" de Februaro Kurt Brenner, direktoro de la "Domo de Heidelberg" (ĝemelurbo de Montpellier) kaj prezidanto de "Lingvoj de Eŭropo". Tiu dujara asocio intencas lukti kontraŭ la hegemonio de unu nura lingvo en Eŭropo, la angla.

K. Brenner konstatas, ke la nombro da lernantoj de la germana en la "Domo de Heidelberg" fakte malkreskas kaj ke la angla ne plu estas kultura lingvo sed lingvo de komunikado. Li ankaŭ rimarkigas, ke la germana estas tre utila en centra Eŭropo (ĉu ne hegemonio ?) kaj fakte lia asocio sin limigas al la agnosko de la diversaj lingvoj (eĉ de la latina), sen solvo de la lingva problemo en Eŭropo. Ni kompreneble informis lin, ke ekzistas solvo, ne menciita de li...

SAT-AMIKARO / SAT

Sat-Amikaro kongresis Paske en Orly; raporto de partopreninto eventuale aperos en la venonta SFS. La 69a kongreso de SAT okazos en Peterburgo (Rusio) de la 13a ĝis la 20a de Julio.

UNIVERSALAJ KONGRESOJ 96,97,98,99... kaj temperaturoj.

Jen por la kvar kongresoj la kutimaj temperaturoj de la koncernaj monatoj (maksimumaj kaj minimumaj), la averaĝa nombro da horoj kun suno, la kutima kvanto da pluvo kaj la nombro da tagoj kun pluvo en la kongresa monato .

96 Prago : 24/13 gradoj, 8horoj, 80 mm/11 tagoj.

97 Adelaïde : 15/7 gradoj, 4 horoj, 65mm/ 11 tagoj

98 Montpellier : (fakte pri Perpignan) 28/18 gradg, 9 horoj, 30mm/4 tagoj

99 Berlino : 23/13 gradoj, 7 horoj, 70mm/ 8 tagoj.

Do estas plej varme kaj sune en Montpellier kaj pluvas malplej (ĉu slogano por nia UK ?)

En Adelaïde estos malvarmete, simple pro tio, ke tiam estos vintro. Ni anoncis erare, ke la UK 97 okazos en Februaro (pli varma monato ol Julio); fakte ĝi okazos Julie.



GRESILLON

Staĝoj por la venonta somero :

En Julio: 7-14/07 ; 14-21/07 ; 21-28/07 -tiu lasta pri gramatiko kun A. Cherpillod

En Aŭgusto : 28/07-4/08 pri traduko kun G. Lagrange ; 4-11/08 ; 11-18/08 ; 18-25/08

Detaloj kaj aliĝiloj de la Kultura E°-Domo, Kastelo de Grésillon, 49150 Baugé (tel : 41 89 10 34)

La Citaĵo de la trimestro / La citation du trimestre :


"L'espéranto est une langue très, très bien faite. Du point de vue linguistique, elle suit vraiment des critères d'économie et d'efficacité qui sont admirables". Umberto Eco, le 27/2/96 sur Paris Première.

KION VI OPINIAS ? QUEL EST VOTRE AVIS ?

Kelkfoje utilas scii tion, kion opinias la koncernataj personoj...Al la listigitaj demandoj, provu respondi kelkajn. Simple prenu blankan folion kaj indiku al kiuj numeroj vi respondas. Anticipan dankon. Sendu al SFS aù al nia sekretario (adreso p.3) aù donu okaze de nia kongreso.



Il n'est pas inutile parfois de savoir ce que pensent les personnes concernées. Vous trouverez ci-contre un questionnaire et nous vous serions reconnaissants de bien vouloir essayer de répondre à quelques-unes des questions. Indiquez seulement sur une feuille séparée à quels numéros vous répondez; envoyez à notre secrétaire (adresse p.3 ou à SFS) ou remettez-nous cette feuille pendant le congrès. Merci à l'avance !



KAMPANJO por prezenti Esperanton al mezgradaj lernejoj de L-R.

(dank'al la profito post la kongreso de Agde). Raportas J. Bony

Dum la 2a parto de Novembro 1995, estis sendita letero al la 239 estroj de la mezgradaj lernejoj de la regiono. En tiu letero, post prezentado de E° estis proponitaj senpage :

- unu el tiuj broŝuroj : -BT2, une langue sans frontière
-Zamenhof ou la langue internationale
- kaj/aù konversacio kun la gelernantoj.

Al la letero estis aldonita duonfolio por indiki la elektojn; do la interesitoj devis respondi kaj montri tiel iom da intereso.

Jen la rezultoj:

	Aude	Gard	Hérault	Lozère	Pyr-Orient.	Entute
Publikaj l.	26	46	67	13	26	178
Respondoj	4	2	5	2	1	14
Privataj l.	4	21	20	8	8	61
Respondoj	0	0	1	2	1	4

Entute 18 respondoj/ 239,t.e. 7,5 %. Petitaj : 11 BT2, 7 Z. ou l.i.

Ankaù indiko de la nomo kaj de la fako estis petita de la responditoj. Respondis :

- 1 instruisto pri angla lingvo,
- 3 estroj (de privataj lernejoj)
- 14 dokumentistoj ; kun 2 el ili, 2 instruistoj montris sian intereson (en la kolegioj de Limoux kaj Agde kun broŝuro estis petita rendezuo); du aliaj dokumentistoj (de Sommières kaj Sète/P. Valéry) krom demando de broŝuro indikis, ke ..."eble poste" (venos intereso pri rendezuo).

La 15an de februaro estis senditaj la 18 broŝuroj, kun letero por danki. Kompreneble, la dokumentisto de Sète povos legi, kun la broŝuro, la reklamon pri la Internacia Semajno de Sète!

Pri la rendezuoj vi legos detalojn en la venonta SFS.

Entute (broŝuroj, poŝtmarkoj, fotokopioj, paperaĵoj) la kampanjo kostis 1563 FF.



NDLR : La procentoj (da respondoj) multe varias de unu departemento al alia; ekzemple en Lozère, ili preskaù atingas 20% dum en Gard, ili apenaù atingas 3%. Ne malutilos iom da reklamo en Gard okaze de nia kongreso en Chamborigaud. Kompreneble la jarfinaj strikoj ne favoris nian aferon !

Demandaro / Questionnaire

à retourner dès que possible à J. Bony. Répondez librement au verso de cette feuille, si possible consultez d'autres espérantistes de votre groupe.

1°) Congrès fédéral : depuis toujours se pose la question de l'organisation sur un jour (dimanche) ou deux jours (samedi après-midi et dimanche). Devons-nous garder l'organisation sur deux jours avec possibilité de participer un seul jour ?

2°) Ce congrès est prévu en principe pour préparer le congrès national mais les projets de résolutions et d'actions parviennent rarement à l'avance. Souhaitez-vous que soient discutées l'action régionale, l'action nationale, les deux ?

3°) Nous avons limité à 2h l'Assemblée générale (bilans,projets).Doit-elle être plus longue ?

4°) En théorie les projets sont exposés en Mai et la réunion du comité en Septembre concerne la réalisation pratique. Faut-il modifier ce système? Se limiter à 1 réunion?

5°) Pour faire participer plus de monde à notre congrès : doit-il être plus convivial (vin d'honneur, banquet,tourisme,bal, discussions en français...)? Suggestions.

6°)Stages de Batipaume et Sète : pour une meilleure participation des espérantistes de la région, que proposez-vous ?

7°) Si vous ne participez ni au congrès, ni aux stages,ni aux réunions de groupe, pourquoi ?

8°) Contenu du congrès : partie artistique, conférence en français avec débat, conférence en E° par un étranger,diaporama,vidéo; que garder?Qu'éliminer?Qu'ajouter?

9°) Pour les débutants et le public extérieur, que proposez-vous?

10°) Rencontre commune avec nos voisins,donec à une distance plus grande? Qu'en pensez-vous?

11°) Vous-même(s) : comment pouvez-vous participer pour la préparation du programme ou de la salle? Pour amener d'autres personnes ?

12°) Recruter des nouveaux, des jeunes. Vos suggestions? Avez-vous proposé notre participation à une foire d'associations? A une rencontre avec d'autres associations, à une radio locale ? Êtes-vous intéressé par un cours par correspondance, un stage accéléré pendant un ou plusieurs week-ends?

13°) Bulletin : (dans la limite de 14 pages pour le poids)
Il vous convient, il n'y a pas assez de....., trop de, manque.....
Il faudrait plus de pages en français.

14°) Universala Kongreso en Montpellier. Avez-vous proposé votre aide au comité? Avant le congrès? Pendant ? Sinon, pourquoi?

15°) Comité et bureau de la fédération. En Septembre, le quorum était tout juste atteint. Faut-il n'accepter au comité que des membres qui viendront régulièrement? Pour le partage des responsabilités, que proposez-vous? Avez-vous des noms à proposer pour étoffer le comité ? Pour renouveler le bureau ?

16°) Points que vous aimeriez soulever.

Merci de votre contribution, même si vous ne répondez que partiellement.

EUROPO

Eĉ se nia bulteneto estas regiona, ne malinteresas nin la poresperanta agado kadre de Eŭropo...
Skribas Raymond Boré :


" Franca Eŭrodeputito reklamas por Esperanto "

Dank'al agado de Germain Pirlot (Oostende-Belgio) kaj kunlaborantoj de li tra Eŭropunio, al kampanjo por uzo de esperanto ĉe la membroj de la Eŭropa Parlamento, fine de januaro, 66 Eŭrodeputitoj de 7 landoj, favore respondis. Ok el ili estas Francoj *.
Plia paŝo antaŭen venis de Jean-François Hory (Grupo ARE en la Parlamento). Antaŭnelonge, Sat-Amikaro eldonis malfaldaĵon (kodo E2, por mendo de ĝi), titolitan "Eurobabel - l'union éclatée". En ĝi, paragrafo detale publikas favorajn opiniojn de Eŭrodeputitoj pri esperanto kaj aparte tiujn de Francoj. Mi kaptis la okazon por sendi ekzempleron de tiu prospekto al la ok francaj deputitoj, ĉefe por sciigi al ili, ke iliaj diraĵoj ne falis en rubujon. En la koverto mi enŝovis poŝtkarton, kies teksto temas pri esperanto en la Eŭropa Parlamento.

Kia estis mia miro, kiam mi ricevis unu el tiuj poŝtkartoj poŝtstampita de "Strasbourg-Parlement Européen". Per ĝi, Sinjoro Hory petis de mi centon da tiu modelo de poŝtkarto... "kiuj, senditaj de "Strasbourg-Parlement Européen" al amikoj miaj, estus sama kvanto da reklamiloj por esperanto", li skribis.

Ĉu necesas aldoni, ke pakaĵo je lia adreso, samtage estis enpoŝtigita ? "

* Nomoj de la 8 francaj Eŭrodeputitoj : Bebear Jean-Pierre (grupo PPE), Bernard-Reymond Pierre (PPE), Bernardini François (PSE), De Brémond d'Ars Georges (PPE), Cabrol Christian (RDE), Caudron Gérard (PSE), Hory Jean-François (ARE), Moreau Gisèle (GUE).



Documento eldonita de la grupo de Le Mans.

Peticio : Post kampanjo ĉe la membroj de la Eŭropa Parlamento, ni proponas al vi sendi peticion al la Prezidanto de la Eŭropa Parlamento. La teksto estas redaktita de Claude Piron kaj Germain Pirlot, entute sur 5 paĝoj. Por ke vi povu prijuĝi, vi trovos dekstre la tekston de la unua paĝo (sur la 4 aliaj paĝoj estas multaj referencoj de libroj, studoj, ktp). Fotokopiu aŭ rekopiu tiun paĝon, subskribu tri personoj, petu de SFS (aŭ en Chamborigaud) la reston de la teksto kaj plusendu al la Prezidanto de la Eŭropa Parlamento. Se ni ĉiam silentas, neniuj priatentos nin !

Vous trouverez ci-contre la première de 5 pages d'une pétition rédigée par Claude Piron et Germain Pirlot au Président du Parlement Européen (sur les 4 autres pages que vous pouvez demander à SFS ou lors de notre congrès de Chamborigaud se trouvent de nombreuses références d'ouvrages et études). Il vous suffit de trouver deux autres personnes pour signer avant d'envoyer le texte complet à Luxembourg. Si les espérantistes (ou espérantophones) veulent qu'on considère leur souhait, à eux de se signaler !

A Monsieur le Président
du Parlement Européen
L-2929 LUXEMBOURG

Monsieur le Président,

Faisant usage de notre droit de pétition, nous, soussignés,

.....
.....
.....
.....
.....

adressons au Parlement Européen les doléances et demandes exposées ci-après :

Dans son article 10, la Convention européenne de sauvegarde des droits de l'homme et des libertés fondamentales précise, à propos de la liberté d'expression, que "ce droit comprend (...) la liberté de recevoir ou de communiquer des informations ou des idées (...) sans considération de frontières".

Or, les citoyens ne peuvent exercer pleinement ce droit que s'ils disposent d'un moyen de communication linguistique facilement accessible à tous, quels que soient le niveau d'instruction et le niveau socio-économique. Il n'est certainement pas dans l'esprit de la Convention de réserver ce droit, *de facto*, à une élite. Afin de clarifier le débat, nous serions reconnaissants au Parlement européen de bien vouloir se prononcer clairement sur les questions suivantes :

1. Juge-t-il important, pour l'édification de l'Europe, de permettre à tous les citoyens de **communiquer entre eux** "sans considération de frontières" avec une aisance aussi proche que possible de celle qu'ils ont dans leur langue maternelle, quelle que soit cette dernière?
2. Accepte-t-il que lorsque plusieurs moyens sont disponibles pour atteindre un but, il faut encourager l'adoption de celui qui présente, pour le maximum de personnes, le maximum d'avantages et le minimum d'inconvénients?
3. Est-il pour lui admissible que, dans un continent qui se dit attaché à la **diversité culturelle**, le choix de 90% des jeunes se concentre sur une seule langue, l'anglais, ce qui confère aux Anglo-Saxons une influence culturelle disproportionnée et limite gravement les chances de connaissance mutuelle des cultures?
4. Est-il pour lui admissible que dans un continent qui se dit attaché aux valeurs démocratiques et à l'égalité des chances, la population se trouve *de facto* divisée entre anglophones et non-anglophones, entre personnes ayant les moyens de bien apprendre l'anglais et personnes dépourvues de ces moyens (étant entendu qu'il s'agit ici aussi bien des aptitudes intellectuelles et de la disponibilité en temps que des moyens financiers) ?
5. Reconnaît-il que si le choix se porte de façon si massive sur l'anglais, c'est parce que le désir de communiquer sans considération de frontières implique que tous optent pour une même langue de communication ? (Autrement dit, reconnaît-il que tout l'effort investi dans l'apprentissage d'une langue se révèle vain pour la communication si les interlocuteurs n'ont pas de langue commune ?)

DISTRA PAĜO

KRUCVORTOJ

I										
II								■		
III						■				
IV		■			■		■			
V				■						
VI								■		
VII	■							■		
VIII										
IX				■						
X										
	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10

Horizontale

- I) Metia foliar(o).
- II) Ruĝa lili(o).
- III) Apudul(o) / s : Subjekto.
- IV) s : Eksploato / s : "Loĝas kun puno" / s : Venta ŝipflanko.
- V) Kokeja lup(o) / Diin(o) neniam malvarmuminta.
- VI) Kontraŭzamenhof(a).
- VII) Kratag(o) flavĉerizodona.
- VIII) Ho, mia kor' !
- IX) Venen(o) / Ĝ(i) malsekigis la piedojn de Helena.
- X) Ili ne konas nigran mizeron.

Vertikale

- 1) Malkrudig(i) materialojn.
- 2) Unumamulin(o) / Apenaŭ apenaŭ.
- 3) Serpent(o) / Odise(o).
- 4) Ĉu l(i) povus meti Parizon en botelon ?
- 5) Malnova azia land(o) / Proverba uj(o).
- 6) s : Ĉielarker(o) / Dio, kia laborint(o) !
- 7) Retroir(i) / Bedaŭiri.
- 8) Radike interna por multaj (?) el ni / Mezepoka membr(o).
- 9) Malfacile altenebl(a) / Dia mamnutrintin(o).
- 10) Venkomemoraĵ(o) / Hungara gambvest(o).

s : sone

B. BERTHONNEAU.

Solvoj de la 135a

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10		
I	A	B	i	T	U	R	I	E	N	T		
II	L	A	■	■	L	E	Z	■	E	U		
III	T	R	i	U	M	■	■	V	i	R	O	J
IV	E	T	S	■	A	A	R	O	N	■	■	
V	R	O	T	E	R	D	A	M	■	P		
VI	N	L	A	T	i	■	■	L	A	B	i	
VII	A	O	R	T	■	■	■	K	O	N	U	S
VIII	T	M	■	E	T	A	P	■	R	T		
IX	i	E	L	■	P	R	■	A	Ĝ	i		
X	V	A	L	E	R	I	A	N	E	L		

La tri tekstoj dekstre estas tiritaj el "Eventoj". Kiam virino rakontas la anekdoton pri la lifto, la vilaĝano fariĝas vilaĝanino kaj la ĉarmulino ĉarmulo.

Se la mondo estus vilaĝo...

Se nia mondo ekzistus kiel vilaĝo kun mil enloĝantoj, tiam estus en ĝi:

564 azianoj, 210 eŭropanoj, 86 afrikanoj, 80 sudamerikanoj kaj 60 nordamerikanoj;

300 estus kristanoj, 175 muzulmano, 128 hinduoj, 55 budhistoj, 47 animistoj, dum la ceteraj 295 estus nekredantoj aŭ ili estus ateistoj;



60 el la vilaĝaj loĝantoj kontrolus la duonon el tutaj elspezoj, 700 estus analfebetoj, 600 vivus en barakurbetoj kaj 500 estus konstante malsataj.

el Kungälv's Esperanto klubb, 5/1995

Rim: Pri la religiaj ciferoj oni devas esti sin-gardaj. Kiel oni kalkulas ekz. personojn, kiuj ĉe la naskiĝo senkonsente estis baptitaj, sed poste prenis alian religion aŭ estas ateistoj? L.S.

Lango-rompiloj

Ĉiuj ĉasistoj ĉiam kaj ĉie senĉese ĉasu la ĉamon.

Ne plu ploru plorulino pro propra plezuro.

Tri tre drinkemaj fratoj trafis truon de l'trotuaro.

Al la apartamento parte apartenas aparta portaparato.

Ne tremas entrepreno pro pertrama teriremo.

Baldaŭ ankaŭ la naŭ astronautoj aperis en aŭtoj.

Lokustoj lope leviĝante loze ludas ĉi-loke.

Mandarenoj maĉe manĝis mandarinojn.

Vilaĝano kaj lifto

Maljuna vilaĝano, komencanta esperantisto, unuafoje en la vivo vizitas grandan kongres-urbon, kie li vidas lifton. Longe li rigardis ĝin kun miro. Foje li vidas, ke maljunulino eniras la lifton. La pordo fermiĝas, kaj la maljunulino malaperas. Post mallonga tempo la pordo de la lifto malfermiĝas, kaj elvenas ĉarma, juna virino.

La vilaĝano gratas sian hartufon kaj ekkrias:

- Fulmotondre! Se mi estus sciinta pri ĉi tiu mirinda eltrovaĵo, mi nepre estus kunportinta ankaŭ mian edzinon!

Por la venonta numero de "Sudfrancia Stelo" bonvolu respekti la daton de la 15a de Junio.

✉ SFS ĉe Jean Hénin, Beauregard, Route de Montcauyroux 48500 La Canourgue

☎ 66 32 86 36 (ankaŭ fakŝilo)

Anticipan dankon !